

# starto

ELDONAS ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO




1982 · 6 · (94)



Karlovy Vary
Jáchymov
Jánské Lázně
Luhačovice
Františkovy Lázně
Teplice v Čechách
Třeboň
Teplice nad Bečvou
Mariánské Lázně
Poděbrady
Jeseník

ŜLOSILO AL VIA SANO
ĈEĤOSLOVAKAJ BANEJOJ

BALNEA
PRAHA

KURACRESTADOJN EN ĈEĤOSLOVAKAJ BANEJOJ CERTIGAS
KAJ PLUAJN INFORMOJN PRI UNUOPAJ BANEJOJ DONAS:

BALNEA, reprezentace československých lázní a zřídel,
Pařížská 11, 110 01 Praha 1, ČSSR
Telex 122 215, Telefon 263 777


# NI GARDU PACON!

/Al L. I. Breĵnev/

Super la ĉerko de grandulo,
luktant' sincera por la pac',
por mond' lumturo en nebulo
dum navigad' en rifa spac',
urĝas la temp', ke ni konsciu
pri la minaco el atom',
kaj ke pri sia devo sciu
ĉiu teran' sub nomo hom'.

Manojn kunigu ĉiuj ĵure
pacon defendi sur la Ter',
ke jam neniam enfuture
ekflamu la militinfer'.

Militon de nukleaj fortoj
kun la homar-perea fin'
sen analist' kun postaj vortoj -
kiu imagi povas ĝin?

Al vi en ĉerko nun kuŝanta,
firma direktu sin promes':
la homa saĝo ĉiulanda
gardos la pacon jam sen ĉes'!

Jiří Kořínek
/11. 11. 1982/

# Na počátku nového období

Znova přišel čas,kdy se naplnil rok našeho života kdy se vracíme v myšlenkách k událostem,které ovlivnily minulé období a vryly se do našeho povědomí,kdy hodnotíme, zda rok,který právě uplynul byl dobrým či špatným.

I v naší organizaci se jistě mnozí zamýšlejí nad minulým rokem i nad rokem 1983,který právě přichází. Nejsou to jen vedoucí funkcionáři našeho svazu či základních organizací ale prostí členové,pokud mají opravdový zájem o další obrodu a rozvoj našeho hnutí.

Chtěl-li bych hodnotit rok 1982 ve vztahu k práci naší organizace musel bych říci,že to byl rok předně rozvoje a aktivizace některých ústředních orgánů a sekcí na druhé straně pak stagnace v činnosti našich některých a to i velkých základních organizací.
Mnoho let se potýkáme s poměrně velice pozvolným přírůstkem členské základny a to je jeden z důvodů ,který nám stále brání důrazněji uskutečnovat různé dobré myšlenky. Proč tomu tak je ? Proč se sice ročně přihlásí za členy mnoho set lidí a skoro stejný počet odchází? Jasně o tom hovoří sociologický průzkum nedávno uskutečněný. Jeho výsledky jsme sice knižně vydali, ale jako by to byla zbytečná práce, ani všichni funkcionáři ji nemají . Dá se říci ,že v zahraničí tato publikace budí podstatně větší zájem. Žeby opět pořekadlo o tom,že nikdo není doma prorokem ...
Jedním ze závažných důvodů v tomto průzkumu je fakt ,že lidé odcházejí proto,že jim naše základní organizace nemohou anebo neumí nabídnout to co očekávali. A co tito lidé,kteří se poprvé dostávají do styku s naším hnutím očekávají? Především realisaci znalosti jazyka,který se naučili. Realisaci jeho uplatnění v praxi, uskutečnění našich vlastních slov,naší propagace a argumentace že esperanto usnadní komunikaci lidí mezi sebou.

Pokud neumíme naplnit představy těchto lidí anebo je neumíme korigovat správným směrem, pokud nabízíme něco, co nezle realisovat,pokud nenaplníme programy našich schůzek novými náměty, formami a nespojíme je s potřebami našeho okolí,zřizovatele,města či továrny kde pracujeme, můžeme se dočkat,že i to pozvolné vzrůstání členské základny ustane. O tom všem hovoří sociologický průzkum o tom všem víme i sami ze své praxe. Podceňovat takovéto zkušenosti se nemusí vyplatit. Zde nepomůže žádný centrální orgán,žádná sekce ani komise. Zde může pomoci jenom každodenní obětavá i namahavá práce. A pro ni vám přeji hodně zdraví. rozvážnosti a mnoho dobrých nápadů.

Ať se stane rok 1983 pro nás všechny rokem jenom dobrého bilancování a rokem splnění touhy všech lidí žít v míru a plném porozumění.

Křimský Zdenko
tajemník svazu



# 75 JAROJ DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

Fine de septembro okazis en la urbo Veliko Târnovo la faka seminario okaze de la 75-jariĝo de BEA. Ĝi fakte estis ne nur seminario, sed vico da diversaj publikaj kaj nepublikaj aranĝoj, kiuj solene omaĝis la gravan jubileon de la bulgara Esperanto-movado. En la plurtaga programo estis publika pacrenkontiĝo en la urbo Polski Trambeŝ, estis malfermita ekspozicio en la ĉefpoŝtejo de V. Târnovo /Esperanto-filatelaĵoj kaj nacikostumaj bildkartoj el la tuta mondo/, artaj programoj, oficialaj renkontiĝoj. Kortuŝa estis inaŭguro de memortabulo al la unua Esperanto-pioniro en Bulgario Ĥristo Popov en la urbeto Dolna Oraĥovica. Oni povis trarigardi lian dometon kun laborĉambro, en kiu estis ekspoziciitaj memoraĵoj je lia agado. La festenon partoprenis vasta loĝantaro de la urbeto.

Dum la faka seminario, en kiu paroladis ankaŭ eksterlandaj gastoj, estis al BEA transdonita la supera ŝtata ordeno de "Bulgara Popola Respubliko". Tiun ĉi parton de la omaĝoj partoprenis pli ol 200 bulgaraj esperantistoj kaj gastoj el 10 landoj - inter tiuj ankaŭ reprezentanto de ĈEA. La riĉa programo kaj la zorgemo de bulgaraj gastigantoj meritas la plej altan rekonon! -vk-

## el fervojista movado

V e n u  i n t e r n i n !

Por la venonta jaro la Fervojista Sekcio de ĈEA preparas kelkajn interesajn aranĝojn lauvice publikigotaj en STARTO. Ĉar presado de STARTO ofte malfruiĝas, ni dissendas perpoŝte la informojn. Se vi deziras kunlabori kun ni, partopreni ĉiujn interesaĵojn kaj ĝustatempe scii pri ili, ni proponas al vi eblon aliĝi al nia sekcio en formo de "simpatiantoj". Vi gajnos tiel avantaĝon de ĝustatempa sciiĝo pri ĉio kaj preferon de la partopreno en ĉiu interesa aranĝo.

Pli detala informo pri la Konferenco de la Fervojistoj en GDR

Niaj membroj riproĉis nin pro malbona informo pri la konferenco en GDR. Mi klarigu la aferon: Laŭ informo ricevita la 18/09/1982 en Dresdeno la Konferenco estis aranĝota 05-07/11/ /1982 proksime de Oederan kaj pli detalaj informoj estis sendotaj. Ĉar mankis la tempo, mi sendis al ĉiuj membroj sole tiun ĉi aliĝilon sen ceteraj indikoj. Nur meze de oktobro venis informo, ke estas invitataj du delegotoj el nia sekcio -


nenio pli. Ŝamtempe aliĝis kelkaj niaj membroj, kies adresojn mi sendis en GDR-on. Mi ricevis telegramon, ke ili estas akceptotaj. Ĉar ekzistas kontrakto pri la kunlaboro inter ambaŭ asocioj kaj tiu ĉi agmaniero ne respondas al ĝi, mi pritraktos plibonigon de la afero denove kun la komitato de FS en GDR - ke ni ĉiam deziros ĝustatempan kaj detalan informon pri ĉiu aranĝo.

Jaroslav Kašparec,
prezidanto de FS de ĈEA

## TRILANDA REKONTIĜO DE LA FERVOJISTOJ

en Prago okazos 21-23/01/1983. Programo: vendrede - alveturo de la partoprenintoj; sabate - inaŭguro je la 8-a horo en la restoracio de la Centra Fervojista Kulturdomo /ÚKDŽ/, Náměstí míru, Praha 2; vizito de la ĉefurbo Prago; 12,30: tagmanĝo samloke en ÚKDŽ kaj poste seminario pri la mallarĝdistancaj fervojoj; vespere amika kunsido en la restoracio "U Fleků" kun interbabilado kaj kantado; dimanĉe - antaŭtagmeze vizito de la Teknika Muzeo /inkluzive originalan karbominejon/; tagmanĝo kaj finigo de la Renkontiĝo. Pli detalaj informoj je la adreso: Jitka Skalická, Koněvova 227, CS-130 00 Praha 3, ČSSR.

## Scienc-teĥnika sekcio de ĈEA



AVIO 83 - Dum la 68-a Universala Kongreso de Esperanto en Budapesto 1983 okazos la unua aeronaŭtika seminario en Esperanto kun la temo: "Aeronaŭtiko ĝenerale kaj aviadiko speciale en pasinto, nuntempo kaj futuro." Iniciatas ĝin Laborgrupo por Aeronaŭtika Terminologio de Scienc-Teknikaj Sekcioj de ĈEA kaj AE SSR kun sia bulteno AVIO. Prelegontoj anoncu vin kun viaj referaĵoj malplej frue ĝis majo 1983. Referaĵo estu tajpita kaj maksimume 10-paĝa. Prelegontoj kaj ceteraj aŭskultontoj bonvolu vin anonci al unu el la adresoj: ORIENTANOJ: Ing. Jan Pospíšil, AVIO 83, Hronská 9/II, CS-040 11 Košice, Ĉeĥoslovakio; OKCIDENTANOJ: s-ro Karel Franc, AVIO 83, Dukla 2287, CS-530 02 Pardubice, Ĉeĥoslovakio.

### DUONJARA INFORMA BULTENO "AVIO"

Aperis la nula numero, kiu alportas sistemigon de nuntempa glisada kaj soarada terminologio laŭ AMTECH-NASA kun la klarigoj den la angla, aldone en Esperanto kaj en la ĉeĥa.



Krom tio ĝi enhavas enhavolistojn de ĉeĥoslovakaj aviadaj gazetoj. Ĝi publikigados enhavolistojn kaj elektitajn artikol-resumojn el pluraj eksterlandaj aviadaj gazetoj. La bulteno ofertas en la rubriko AVIOSERVO al la fakuloj senpage resumojn laŭ la anoncitaj enhavolistoj. Ĝi aperis ankaŭ en la ĉeĥa eldono, aperis metodikaj folioj por nacilingvaj eldonoj de AVIO. Nombro de naciaj eldonoj kaj riĉeco de la Esperanta dependas nur de tio, el kiuj landoj anonciĝos pluaj kunlaborontoj. Fakuloj-aviadistoj, eksaj aviadistoj, avioamatoroj, flugmodelistoj, flugsportistoj, paraŝutistoj, aviomekanikistoj, bortnavigistoj, balonistoj, Rogalistoj, pendglisistoj, k.a. AŬDIĜU al la supre menciitaj adresoj, nur ŝanĝu la noton je "AVIO bulteno".


### DUDEKO DA FAKAJ VORTOJ POR PRAKTIKA UZO /7/

A n g u l o j

akuta angulo - ostrý úhel
alternaj anguloj - střídavé úhly
angulo de bevelo - úhel zkosení
angulo de taluso - úhel sklonu svahu
apudaj anguloj - vedlejší úhly
centra angulo - středový úhel
komplementaj anguloj - doplnkové úhly
konkava angulo - dutý úhel
obtuza angulo - tupý úhel
orientita angulo - orientovaný úhel
orta angulo - pravý úhel
plena angulo - plný úhel
respondaj anguloj - souhlasné úhly
samflankaj anguloj - přilehlé úhly
solida angulo - prostorový úhel
streĉita angulo - přímý úhel
superstreĉita /konveksa/ angulo - vypuklý úhel
suplementaj anguloj - výplňkové úhly
verticaj anguloj - vrcholové úhly
vidangulo - zorný úhel

-we-

## ni recenzas



Endre Tóth: LAPPAR, LA ANTIKRISTO. Eldonis Hungara Esperanto-Asocio, Budapest 1982. 140 paĝoj 18x12 cm.

La aŭtoro Endre Toth mortis en 1981, estante nur 50-jara. Li verkis originale en Esperanto. La libron redaktis Vilmos Benczik. Ĝi enhavas 14 rakontojn kaj unu radioludon. La titola rakonto ricevis ĉe la Belartaj Konkursoj de UEA la 1-an premion en 1976, ankaŭ du aliaj rakontoj estis premiitaj.

- La rakontoj estas interesaj kaj kondukas la leganton en la plej diversajn mediojn de la nuntempo aŭ proksima pasinteco. Precipe mi trovis interesa la titolan rakonton pri kvar knaboj, el kiuj la "antikriston"Lappar renkontas kruda vivofino fare de liaj"amikoj", super kiuj li diktatoris kaj mem iniciatis ilin al la brutala fina ago. El la ceteraj rakontoj estas interesaj Pordoj, La ŝtonsegil-maŝino, humura estas La vojperdinta biciklisto, plej longa el ĉiuj. Tata Ben estas prikrima kaj la lasta, Kristnaska saluto, estas mallonga radioludo. En ĝi iom forglitis la logika pensado de la aŭtoro, ĉar ĉe la fino, el la difektita sonbendo estas reproduktataj torsoj de frazoj, sed la vortoj estas ĉiam tutaj. - La lingvaĵo estas pura, enestas pluraj preseraroj. Legu la libreton, mi pensas, ke vi estos kontenta.

János Elem: ĈU VI VIDIS JAM LA PIEDSIGNON DE L'PROFETO? Teatraĵo. Tradukis Vilmos Benczik /la prologon J. Horváth kaj P. A. Rados./ Eldonis Hungara Esperanto-Asocio, Budapest 1982. Paĝoj 92, 20x13,5 cm. Tekstoj en lingvo hungara kaj E.

La Turisma Oficejo SED NI SAME organizas 14-tagan libertempan ekskurson en lokon eksterkutiman - mi ne malkaŝos al vi kien - mi volas nur diri, ke tie povus esti vidata "la piedsigno de l'Profeto", se ĝi ekzistus. Grupo da homoj venas per aŭtobuso en la lokon kaj vivas tie sen kia ajn komforto. Unu knabo kaj pluraj geviroj. Estiĝas diversaj situacioj, iuj ŝercaj, iuj streĉaj, oni ankaŭ filozofietas. La ĉiĉerono parolas, sed ne komprenas la lingvon de la turistoj - apartaĵo, ĉu jes? Sed la tuta historio bone finiĝas. - Komencante legi la libron oni estas surprizita kaj per la formo kaj per la stilo de la prologo. Tiu ĉi estas ne teatraĵo, sed prozo, en kiu nur unu persono estas konata: la ŝoforo, kvankam ofte oni trovas rektan parolon de aliuloj. La ŝoforo minacas al la pasaĝeroj, ke la aŭtobuso veturos en abismon. La lingvo abundas ĉi tie je vortludoj, iam lascivaj, oni trovas en ĝi rimojn eĉ stultaĵojn /avinjo karesas sian barbon/. La homoj ankaŭ bojas, unuope eĉ amase. Feliĉe nur kvin paĝoj estas tiaj. - La tuta libro estas senerara, nur en la prologo oni ne scias iam, ĉu temas pri ŝerco aŭ pri preseraro. - La teatraĵo, konsistanta el du aktoj po du bildoj, disponas bonan amuzon, do legu ĝin almenaŭ. La tutmonda premiero okazis esperante en Budapeŝto en marto ĉi-jara. - La libron distribuos ĈEA-libroservo.

Adolf Staňura





## el junularo vivo

La 9-an ĝis 10-an de oktobro 1982 estis establita Junulara Sekcio de ĈEA. Al la sekcio povas aliĝi ĉiuj ĈEA-anoj ĝis 35-a jaraĝo, kiuj deziras aktivi en la junulara Esperanto-movado. Escepte povas aliĝi ankaŭ ĉiuj pliaĝuloj ĝis nun laborintaj en tiu ĉi fako. Pri la statuto de la nova Junulara Sekcio de ĈEA estos informitaj ĉiuj lokaj grupoj de ĈEA. Aliĝu ĉiuj junaj esperantistoj /ankaŭ ekde 15 jaroj/ - kondiĉe, ĉu ili estas regulaj membroj de ĈEA.

Diversaj renkontiĝoj kunlabore kun la membroj de la Junulara Sekcio estas preparataj. Ĉiu povas kontribui per sia sugesto.

La aliĝilojn petu ĉe la adreso: Jan Navrátil, Třešňová 208, CS-417 42 Bohosudov.

### ▷ ĈU ANKAŬ VI VENOS HELPI ? ◁

Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj Junulara Sekcio anoncas por la jaro 1983 komunan aranĝon destinitan por rekonstruado de la domo posedata de ĈEA en BOR U TACHOVA. Ni bezonas ĉiun komplezan manon. Ne necesas esti fakulo. Decidas volo, elano kaj sindonemo. La domon ni volas rekonstrui memlabore /"brigade"/ kaj dediĉi ĝin al la tuta asocio por seminarioj, renkontiĝoj kaj rekreacio.

Ni organizos semajnajn kaj ankaŭ semajnfinajn laborbrigadojn. La Junulara Sekcio alpropriĝas la konstruadon kaj tiun, kiu tie laboros dum plej multaj horoj, ĝi anoncos en la konkurso "Laboregemulo de la Asocio" venkinto kun speciala premio. Ni akceptas ankaŭ interesiĝontojn el eksterlando. La restadon ni surloke rekompencas. Kiu ajn konstruprofesiulo estas preferata. La alvoko rilatas kompreneble ankaŭ ĉiujn, kiuj ne envicigas sin plu en la junularon. Venu, ne timu, ankaŭ gaja atmosfero ekestos. La aranĝo estos ekigita per ordigaj kaj preparaj laboroj en marto 1983.

### ▷ ALVOKO AL ĈIUJ ESPERANTO-KLUBOJ, ◁

rondetoj kaj grupoj:

1/ Oni povas skribi pri Esperanto kaj pri konkreta agado de la junularo en la kluboj al ĉeĥa ĵurnalo "Mladý svět".
2/ La afero estis persone priparolita kun redaktoro de MS Pavel Stefanovič, kiu bonvenigos ĉiun kontribuaĵon pri la agado de nia Esperanto-junularo: la artikoloj estu interesaj, riĉaj kaj plenaj de juneco.
3/ Ĉiujn tiujn ĉi kontribuaĵojn sendadu je la adreso: Jan Řepa, Na Valše 250, CS-384 11 Netolice. Li elektos el ili kaj la elektitaj kontribuaĵoj estos senditaj rekte al

la redakcio de Mladý svět, kompreneble kun nomoj kaj adresoj de la kontribuantoj.

Tiun ĉi ŝancon ni devas utiligi! Rapidu, la tempo laboras kontraŭ ni!

▷ SKITAGOJ EN KRKONOŠE ◁

estas proponataj al vi de ĵus fondita Junulara Sekcio de ĈEA. Informoj ĉe adreso de la prezidantino de la Sekcio Máša Vančurová, ĈEA, Jilská 10, 110 01 Praha 1.

▷ INTERNACIA JUNULARA KONGRESO EN DEBRECENO ◁

/Hungario/, okazos 23-31/07/1983. Ni preparas la partoprenon pere de komuna pervagonara ekskurso. Ankaŭ eblas organizi grupon por biciklistoj - KIU DEZIRAS GVIDI LA AFERON?

▷ INTERNACIA JARO DE JUNULARO 1985 ◁

Unesko proklamis jaron 1985 "Internacia Jaro de Junularo" /IJJ/. Dum la UK en Antverpeno kaj IJK en Loveno estis akceptitaj rezolucioj pri tiu ĉi grava aranĝo kaj ankaŭ estis establita komuna UEA/TEJO-komisiono por IJJ.

# tra la mondo

ĈEĤOSLOVAKIO * Ĉeĥoslovaka Radio, eksterlanda elsendado, preparis pli ol duonhoran programon kun sekretario de nia Asocio pri la Esperanto-movado en ĈSR. Estas interese, ke post la propono de nia Radio al eksterlando tiun ĉi programon mendis Vjetnamio; simila programo estis surbendigita por Bulgario.

BRAZILO petis oficiale ĉeĥoslovakan registaron komisii nian Asocion por alsendo de disponigeblaj libroj kaj ĵurnaloj al Monda Ekspozicio de la Esperanto-literaturo. Ni plenumis la peton kun intereso.

USSR * Naciaj Esperanto-asocioj interesiĝas pri la rekta kunlaboro kun nia Asocio. Ni pritraktis la eblon speciale kun Esperanto-reprezentantoj el ĉebaltaj respublikoj. Pri la evoluo de la rilatoj ni informos vin.

BELGIO * Petro DE SMEDT, 47-jara, akiris en julio 1981 "kun granda distingo" diplomon de licenciato pri orienta filologio /japana-ĉina lingvoj/ ĉe la ŝtata universitato en Gento /Belgio/ per disertacio pri la "Tradukaĵoj el la nederlanda literaturo en la japanan". En la disertacio Esperanto estas ofte citita, ludis gravan rolon ĉe la akiro de informoj kaj diskutado pri la ĝusta senco de vortoj kaj esprimoj. Diversloke esperantaj tekstoj aperas flanke de alilingvaj kaj la bibliografio listigas dekon da esperantaj vortoj.

AŬSTRALIO * En Sydney Esperanto estas instruata por komencantoj kaj progresantoj, kaj ankaŭ en la norda ŝtato Kvinslando Esperanto estas instruata en lernejoj.



BULGARIO * La Ministerio de Popola Klerigo enkondukas ekde la nova lernojaro 1982/83 fakultativan instruadon de Esperanto ankaŭ en la X-aj klasoj de ĉiuj mezlernejoj. Tio estas nova grava akiraĵo por la bulgara E-movado. Ĝi kontribuos por plifirmigo de la lingvosciojn, akiritaj en la IX-a klaso. - En la pasinta lernojaro 34 gelernantoj de Ekonomia Mezlernejo "V. Piskova" lernis fakultative Esperanton.

ĈINIO * La 15.5.1982 okazis la inaŭguro de perfektiga Esp. kurso en la fremdlingva fakultato de Anhui-universitato.

GERMANIO - FRG * Kiel suplemento al la studprogramo en la fako Literaturo kaj Lingvistiko ĉe la Universitato en Paderborn, okazas regula kurso pri interlingvistiko. Ĝi ampleksas enkondukon en la teorion de interlingvistikaj studoj kaj praktikan parton en la formo de Esperanto-kurso. La instruadon gvidas D-rino Aicja Sakaguchi.

HUNGARIO * La 19-an de marto 1982 doktoriĝis en la Budapeŝta Universtiato f-ino Zsuzsa Varga-Haszonits pri la temo "La tn. 'naturalisma skolo' en interlingvistiko - kritika analizo". Ŝi estas la kvara doktoriĝinto el la esperantologia fako de prof. Szerdahelyi.

KOREO * De 10.-29.5.1982 elementa kurso en la universitato Dong-a. 9 personoj finlernis kaj estiĝis novaj membroj de la klubo en universitato Dong-a.

SVISLANDO * En Locarno Dante Bertolini, verkisto kaj emerita lerneja inspektoro, gvidas 4 Esperanto-kursojn, i.a. kadre de eksperimenta klaso ĉe la praktika porinstruista lernejo. Post kunveno kun gepatroj kaj aliaj interesuloj favore raportis tri tiĉinaj gazetoj.

VIRINA AGADO * De la 1-a de januaro ekaktivis Virina Esperantista Junulara Germana Asocio. Post fondiĝo en Sensenstein okazis pluraj kunvenoj interalie en Hamburg kaj Osnabrück en FRG. Informojn pri V.E.J.G.A., nova sekcio de Germana Esperanto-Junularo, sendas: U. Felhöter, Töpferstr. 20, D-4500 Osnabrück, kaj B. Brandenburg, Am Burgweiher 64, D-5300 Bonn 1.

26-a INTERNACIA SEMINARIO * Tiun seminarion, samtempe kun festivalo por mezaĝuloj organizis Germana Esperanto-Junularo de 27.12.1982-3.1.1983 en Oberwesel ĉe la Rejno.

ĈINIO * Laŭ "Esperanto-Information" de presservo de Svisa Esperanto-Societo lernas tiutempe 60.000 ĉinoj la Internacian Lingvon. - Ekde la komenco de 1982 aperas plia esperanta periodaĵo, aldone al la internacie konata "El Popola Ĉinio". Temas pri "La Mondo", preskaŭ komplete ĉinlingva kaj destinita por la enlanda Esperanto-movado. En la unuaj ses monatoj de sia ekzisto "La Mondo" jam akiris 6.000 abonantojn. - La 9.5.1982 okazis la inaŭguro de la Esperanto-Asocio en Zhenjiang, Jiangsu-provinco, kiun partoprenis pli ol okdek personoj. - Por levi la lingvo-nivelon kaj kulturi esperantajn aktivulojn, la Esperanto-Asocio de Hunan-provinco establis Esperanto-instituton en la dua tagdeko de aprilo. - La 16.5.1982 fondiĝis en la fama turisma urbo Guilin Esperanto-grupo sub la favoro de la loka registaro. Nun en la urbo estas 250 lernantoj de Esperanto. - La 12.5.1982 esperantistoj de

la gubernio Dunha, Jilin-provinco, starigis la Societon por Popularigo de Esperanto, kiu havas sub si 5 studrondojn.
FINNLANDO * La Civitana Instituto de Oulu ankaŭ dum la ĵus komencanta studjaro havas en la programo Esperanto-instruadon. Estas elementa kaj daŭriga kursoj, kiuj laboras sub gvido de Osmo Buller.
HISPANIO * La Internacia Sporta Simpozio, kiu okazis en julio en Madrid, sub la Honora Patroneco de Juan Carlos I, Reĝo de Hispanio, kaj sub la aŭspicioj de UEA kaj HEF; pritraktis la medicinajn, jurajn, sociologiajn, ĵurnalismajn, historiajn, lingvajn kaj handikapulajn aspektojn de la sporto. La temoj estis analizitaj de bazaj raportoj eldonitaj libroforme. - Okaze de la Tutmonda Futbalĉampioneco, okazis en Gijon, sub la nomo "Panoramo Asturio-82" montrofoiro, en kiu, laŭ afabla ĝentileco de la Direkcio de la Foiro, oni disponigis senpage al la Astura Esperanto-Asocio standon, en kiu oni montris afiŝojn pri diversaj naciaj kaj universalaj Esperanto-kongresoj, librojn, kovertojn kun specialaj memorigaj stampoj ktp. - Oni disdonis milojn da informiloj kaj oni informis pri Esperanto pere de regionaj ĵurnaloj kaj radiostacioj. - Nova Esperanto-grupo: Karthago--Nova en la provinco Murcia.
ITALIO * En Romo, dum tuta semajno meze de junio, daŭris ekspozicio, aranĝita de la itala sekcio de MEM kaj Eldona Komitato por Hiroŝima-Nagasaki. La ekspozicio konsistas el 150 grandformataj fotoj kaj estas facile utiligebla ankaŭ aliloke.
SVEDLANDO * Ankaŭ ĉi-jare Klubo E-ista de Malmö partoprenis per informa budo kaj ekspozicio pri Esperanto en Skania Foiro, kiu ĉi-jare okazis por la 64-a foje inter la 20-a kaj 29-a de aŭgusto.
SVISLANDO * La neŭŝatela popolo voĉdone akceptis novan leĝon, kiu donas al la ŝtato la rajton subvencii ia. la bibliotekon de La Chaux-de-Fonds kaj la Centron de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia /CDELI/. La ŝtata subvencio devus ebligi la eldonadon de bibliografio pri Esperanto kaj interlingvistiko kaj la salajradon de la necesa/j/ funkciulo/j/.

# RONDETA VIVO

BRNO * Ekde la 6.10.1982 funkcias nova E-kurso por komencantoj kun 17 partoprenantoj. Ekde la sama tago kontinuas kurso por progresintoj kun 11 personoj. Ambaŭ kursojn gvidas J. Vondroušek. - Sukcesa kunveno okazis la 12.10.1982 kun E-TRIO /E. Seemanová, J. Budínská, J. Budínský; ĉiuj el Prago/ kun la programo "Foiraj Kantoj". Plenplena salono, entuziasma akcepto. - Memorinda vespero kun poeto Jiří Karen, aranĝita de Klub školství a vědy Bedřicha Václavka kaj EK Brno, okazis la 19.10. 1982 je temo "Kiamaniere eblas per la poezio terapie influi nian sanstaton". En la muzika parto krome estis prezentitaj muzikigitaj poemoj de J. Karen "La Manoj" kaj "Balado pri Amo"; plue la poemoj de poeto Z. Spilka el la ciklo "La Suda Suno"; ĉiujn poemojn muzikigis komponisto D. Spilka tre impresive. Kantis J. Nenadálová, membro de opero kaj ludis prof. M. Janáková. Plenega salono, ĝojiga etoso.
OPAVA * Poezian vesperon okazigis la 25.10.1982 E-rondeto Ostroj kunlabore kun Memordomo de P. Bezruč en Opava. La vespero estis dediĉita al la poezia verkaro de Josef Rumler, kiu estas konata ĉefe kiel tradukinto el kelkaj slavaj lingvoj, kritikisto kaj redaktoro. Li aktive laboras en la Literatura kaj arta sekcio de ĈEA. La artan programon prezentis geaktoroj de Silezia Teatro en Opava, la ĉeestinta aŭtoro rakontis pri sia laboro inkluzive tiu poresperanta. Inter la aŭskultantaro, kiu plenigis la intiman salonon de Memordomo de P. Bezruč, estis ankaŭ esperantistoj el Ostrava. La sukcesa vespero estis anoncita afiŝe, en loka gazeto kaj per specialaj invitiloj. - Sabate 23.10.1982 renkontiĝis kelkaj esperantistoj el Opava kaj Šumperk en montaro Jeseníky. Komune ili marŝis tra montopintoj de Ramzová al Červenohorské sedlo. Car la vetero estis konvena kaj la naturo aŭtune bunta, ne mankis bona humoro. La komuna "promeno" tre plaĉis al ĉiuj marŝintoj, tial ili interkonsentis pri similaj ekskursoj ankaŭ venontjare.
PODĚBRADY * La 5-an de oktobro 1982 estis en la nova lernejo ZŠ en Poděbrady la poeto Jiří Karen. Li rakontis al la gelernantoj pri la laboro de poeto. Infanoj aŭskultis kun ega interesiĝo kaj mem, per propraj demandoj kaj rimarkoj aliĝis en la interparoladon. Certe, la vizito de la poeto estis por la lernejo festotago. La ĉeeston de la poeto eluzis ankaŭ la rondeto, interesiĝanta pri Esperanto, kiu funkcias ĉe la lerneja PO 5B. La poeto Jiří Karen ankaŭ kunvenis kun la banejgastoj, en saloneto de la biblioteko. Oni devas aldoni, ke ĉiuj tiuj kunvenoj estis organizitaj kunlabore kun la loka grupo de ĈEA.



PRAHA * Dum la festeno okaze de 80-jara jubileo de la Esperantista klubo Praha, kiun vizitis multaj personoj, estis ankaŭ riĉa elektebo de la E-libroj kaj ĵurnaloj en improvizita vendejo. Sur la bildo /de dekstre/ s-aninoj Šperlingová, Vojtová kaj Křenková dum la vendado.


PŘEROV * Klubo de la Esperantistoj de ZK ROH Přerovské strojírny ricevis honoran titolon "de la Pacdefendantoj". Du anoj partoprenis UK en Antverpeno, la aliaj gastis en Abaliget. La klubo instalis jam la 16-an de aŭgusto 1982 ekspozicion "Kvin jaroj antaŭ la jarcento" okaze de la 95-jara jubileo de Espe-

ranto kaj de la 60-jara jubileo de la E-movado en Přerov. La ekspozicio pro granda intereso estis plilongigita ĝis fino de oktobro. Okaze de la Internacia Komunika Jaro 1983 la libro "Kontinento sen Interpretistoj" estis transdonita al Distrikta kaj Urba Popola Komitato en Přerov /kultura fako/, al la redakcio de Nové Přerovsko kaj al redakcio de la uzina gazeto Přerovský strojař. Solene la libro estos transdonita al Distrikta Pionira kaj Junulara Domo, kie sukcese daŭras la E-kurso gvidata de niaj anoj en la Klubo de Internacia Amikeco. - Sabate la 2-an de oktobro 1982 en Přerov okazis Nordmoravia aktivo de la konfiduloj.

ROUDNICE * En nia laborteritorio, en distrikto Litoměřice, okazas 3 kursoj de Esperanto por lernantoj de la 3-a klaso: en Pionira kaj Junulara Domo en Roudnice; en ZŠ Křešice; en Lovosice. La kurson en Lovosice gvidas nia membro Fr. Veselý.

ŠUMPERK * Niaj klubaninoj dissendis al ĝenerala sekretario de UN kaj al 31 virinoj en 16 landoj por plua disvastigo la ĉenleteron skribitan esperantlingve kaj eldonitan sugeste de FLE /Federacio de Laboristaj Esperantistoj/ "Amelo" en Nederlando. En la letero estis alvokitaj la virinoj de la tuta mondo por postuli, ke UN faru ĉion, kio eblas por atingi la tutmondan malarmadon. - La 15-an renkontiĝon apud la Esperanto-arbo en kastela parko de Velké Losiny partoprenis 48 gesamideanoj el nordmoravia kaj orientbohema regionoj. La ĉeestintoj trarigardis la kastelon, la papermanufakturejon el la XVI-a jc. - unusola en Europo - kaj post amuza parto de la programo iuj vizitis la naturan termalbanejon. - La porkomencanta kurso estis malfermita la 14-an de oktobro. La porprogresintaj kursoj daŭras ekde la 30-a de sept.1982.

## el leterkesto



La nov-fondita Altenburga E--klubo "MALNOVKASTELO" /GDR/ deziras korespondi kun viaj samlandanoj. Ĝis nun ni estas 6 anoj. Por ke kresku niaj adeptoj bonvolu peri mian adreson aŭ sendu al mi gazetojn, klubajn adresojn, E-informojn kaj E-informilojn pri via lando. Nov-fondita E-klubo "MALNOVKASTELO" deziras korespondi kun ĉeĥoslovakoj pri ĉiuj temoj. Respondoj estas garantiitaj. Nia adreso:

"MALNOVKASTELO",
H.-G. K a i s e r,
DDR-7400 ALTENBURG,
Wenzel-str. 12
G D R



POR MODERNA SOMERA
VESTIĜO DOMO DE MODO
Dunaj
DOM MÓDY-BRATISLAVA

POR VIA KOMFORTO UTILIGU
ALSENDAN SERVON !

Administracio de Porinfana kuracejo en Poděbrady invitis min rakonti al infanoj de la kuracejo pri Esperanto. Mian adreson ili trovis sur afiŝo, anoncanta malfermon de la nova kurso de Esperanto. Mi vizitis la kursejon la 13-an de oktobro. La infanoj - da ili estis ĉirkaŭ 40 - aŭskultis atente mian rakontadon pri Esperanto. Mi diris al ili pri la aŭtoro de Esperanto, kiel ekestis la E-movado, kaj pri ĝia evoluo ĝis hodiaŭ, pri landaj asocioj, pri UEA, pri la delegitoj. Mi rakontis pri la lingvaj malfacilaĵoj en la mondo kaj eblo de la solvo per Esperanto, ktp. Kiam mi menciis E-gramatikon, por pruvi, ke Esperanto estas multe pli facila ol kiu ajn nacia lingvo, ili entuziasme respondadis miajn demandojn. Mi opinias, ke tia propagando de Esperanto estas bona, ĉar la infanoj nun scias ion pri Esperanto kaj grave estas, ke ilia scio estis pozitiva.

J. Skramuský

# KRONIKO

Fama ŝakluda Esperanto-funkciulo Ladislav FIALA ĝisvivis la 27-an de decembro 1982 sian 60-an jaraĝon. Ni deziras por pluaj liaj vivjaroj multe da sano kaj bonhumoro.

*

Dumviva membrino de nia Asocio Růžena KRIMSKÁ edziniĝos la 21-an de januaro 1983 al Miĥal PAKANDL. Ni deziru al tiu juna geedza paro plenan interkomprenigon kaj amon dum estonta komuna vivo.

*

En aŭgusto 1982 forlasis niajn vicojn multjara membro de ĈEA kaj honora prezidanto de la loka grupo en Olomouc Stanislav ŘÍMSKÝ en aĝo de 76 jaroj. Li meritiĝis precipe pro esperantigado de plej variaj fakaj artikoloj, per kies prelegado li ankaŭ longdaŭre pliriĉigadis la klubajn programojn. Ni konservos lin en nia dankema memoro. Lia familio akceptu niajn plej profundajn kondolencesprimojn.

*

Kun granda tristo ni anoncas, ke post nelonga grava malsano forlasis niajn vicojn en sia 51-jaraĝo ĝentila samideano kaj kamarado Josef LUKEŠ el Příbram. Honoron al lia memoro! - Esperantistoj el LG de ĈEA en Příbram.

*

Mi sciigas al vi, ke mia edzo Miloslav BLAŽEK forpasis la 11-an de oktobro 1982. Li estis kremaciita la 19-an de oktobro 1982. Mi petas vian rememoron. - Hilda Blažková, Bezděkov 470, CS-560 02 Česká Třebová, ČSSR.

# INFORMOJ EL SEKRETARIEJO

## JEŠTĚ K 68. UK V BUDAPEŠTI 1983

Při expedici STARTa č. 4/82 jsme Vám nedopatřením nezaslali přihlášku na 68. Univerzální kongres esperanta v Budapešti. Proto jsme je zaslali v č. 5/82. Prosíme zájemce, aby ji obratem odeslali, pokud tak ještě neučinili. Po jednání v DCK REKREA bylo rozhodnuto, že zorganizujeme společně zájezd pro 80 - 100 osob a zajistíme pro ně plné služby /tedy za-



placení kongresového poplatku, ubytování, plná penze a kapesné /. Přihlášeným zasíláme složenku na zaplacení prvé zálohy na celkovou cenu 2.560,--Kčs. Dopravu si každý zaplatí sám. Budeme jednat o možnosti zajistit místenky nebo lehátka ve vagonech. Zbytek ceny uhradíte v I. čtvrtletí 1983. Úhrada jenom kongresového poplatku přes SBČs nebude možná. Ubytování v MLR bude ve 3-lůžkových pokojích s příslušenstvím. Příme dotazy posílejte na : L.Rýznar, Na Okrouhlíku 953/21, 530 03 Pardubice.

## RENKONTIĜO EN DRESDENO

La 18-an kaj 19-an de septembro 1982 okazis en Dresdeno la unua Distrikta Renkontiĝo de la esperantistoj en la ejo de Kulturliga grupo. Ĉeestis proksimume 100 esperantistoj, inter ili 20 gastoj el Ĉeĥoslovakio kaj Hungario. La estro de distrikta estraro d-ro Minkwitz raportis pri la 10-a Kongreso de la Kulturligo. Sekvis informoj pri la 9-a Ĝenerala Konferenco de MEM - de d-ro Blanke. Li informis la kunsidon ankaŭ pri la 67-a UK en Antverpeno kaj pri la venonta kongreso en Budapeŝto. Dimanĉe matene okazis seminario pri problemoj de metodiko de la instruo ĉe la heterogena ĉeestantaro. Niaj ĉeĥaj gastoj entuziasme raportis pri siaj propraj spertoj en tiu medio. Samtempe okazis en "Klubo de la Intelektularo" la kunsidoj de la MEM-komisiono kaj de la grupo "scienco-tekniko". Rimarkinde estas, ke dum la tuta aranĝo nur regis la lingvo Esperanto.

## INTERNACIA FOIRA ESPERANTISTA RENKONTIĜO 1983 IFER '83

estas unika renkontiĝo senpere antaŭ la komenco de la printempa foiro en la dueplejgranda urbo de GDR, LEIPZIG. Ĝi okazos de la 11-a ĝis la 13-a de MARTO en 1983. El la programo: vendredo, 11.03.1983: Urba gvidado, interkonatiĝa vespero; sabato, 12.03.1983: Prelego "Formoj de la terminologia laboro"; fakkunsidoj de fervojistoj, komputistoj, medicinistoj, poŝtistoj; prelego "Eduko al zorgo pri la vivomedio"; prelego "Venkintoj en la historio" /la venko de G. Dimitrov antaŭ la Regna Tribunalo en 1933/; prelego "El la historio de Bulgario en la 20-a jarcento"; komuna vespermanĝo, kultura programo kun danco, tombolo ktp.; dimanĉo 13.03.1983: horeto de arta kantado; prelego "La vivoverko de Julio Baghy"; oficiala adiaŭo; komuna tagmanĝo kaj laŭvola urba gvidado. Ni ofertas al vi: librovendejon, vendejon de filatelaĵoj, suveniran standon, specialan IFER-poŝtkeston por la porokaza stampo. De vi ni atendas: bonan humoron kaj aktivan partoprenon. Ĉiu aliĝanto devas plenigi apartan aliĝilon. Petu ĝin ĉe la Organiza Komitato de IFER, DDR-7010 LEIPZIG, Käthe-Kollwitz-Str. 115, GDR.

## EN 1983 DENOVE EN ERCMONTARON!

Loka Grupo de ĈEA en KARLOVY VARY kore invitas ĉiujn pacamikojn-turistojn al la

VI-a INTERNACIA TURISMA RENKONTIĜO
DE ESPERANTISTOJ EN ERCMONTARO

okazonta de la 23-a ĝis la 28-a de junio 1983 en la turisma loĝejo "BESEDA" en Nové Hamry /trajo ČSD 14c Karlovy Vary -

- Potůčky/. Ni proponas al vi tri aŭ kvar tuttagajn piedmarŝojn en pitoreska regiono apud Karlovy Vary; tuttagan viziton de la mondfama banejurbo Karlovy Vary kaj banadon en ties termala naĝejo. Estas preparita abunda kaj gaja kultura programo. Prezo por ĈSSR-civitanoj /pagenda per la poŝtpagilo/ Kčs 500,-; prezo por la eksterlandanoj /pagebla surloke/ Kčs 550,-. Informojn kaj aliĝilojn petu de LG ĈEA, Jaroslav Klement, Kpt. Nálepky 7, CS-360 04 KARLOVY VARY-Bohatice, ĈSSR. - Venu amase kaj manifestu kun ni por subteno de la rezultoj de la Monda Asembleo por Paco kaj Vivo, kontraŭ Nuklea Milito - por rememoro de la 30-jara jubileo de MEM! /Limdato por aliĝo la 1-an de majo 1983/.

## 5-a INTERNACIA RENKONTIĜO DE ESPERANTISTOJ ĈE BERLIN

Ankaŭ en 1983, inter la 12-a ĝis la 25-a de septembro, okazos jam iom konata internacia aranĝo IREBIK en moderna internacia kampadejo Krossinsee ĉe Berlino. IREBIK celas doni al siaj partoprenantoj la eblecon altigi sian lingvan nivelon, konatiĝi kun la ĉefurbo de GDR Berlino kaj ties belega arbaroriĉa kaj multlaga ĉirkaŭaĵo, doni eblecon ferii kaj ripozi en la internacia medio. - Laŭ la programo de IREBIK antaŭtagmeze oni ofertos lingvan kurson, posttagmeze kaj vespere okazos kulturaj aranĝoj, ekskursoj, seminarioj, prelegoj ktp. 4 tagoj estas programliberaj por ĉies propra programo. La partoprenontoj de la internacia renkontiĝo loĝos en malgrandaj domoj, kiuj troviĝas sur la tereno de la kampadejo "Intercamping", ĉirkaŭataj de arbaro kaj starantaj rekte ĉe la bordo de la belega "Krossin"-lago. - La partoprenontoj mem devas zorgi pri la maten- kaj vespermanĝoj dum la tuta restado en la kampadejo kaj krome ankaŭ por la tagmanĝoj en la alvenokaj forvetur-tagoj. - La partoprenkotizoj sumiĝas je 250,- GDR-markoj por GDR-anoj, 300,- markoj por eksterlandanoj. La aliĝilojn sendu al: Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, Distrikta Estraro Berlin, DDR-1020 BERLIN, Breite Str. 35-36.

## EL RUMANIO

venis letero atestanta, ke ĝi anstataŭas rumanan esperantistan gazeton. Ĝi fariĝos interligilo de rumanaj kaj eksterlandaj gesamideanoj kaj enhavos novaĵojn, anoncojn el esperantista movado. Viajn opiniojn kaj proponojn estas dezirataj kaj petataj. Bonvolu skribi al VOCHIN MARIAN, p. k. 30-93, 71400 BUCUREŞTI 30, RUMANIO.

Poste ni legis tiujn informojn: Pro la malfavoraj kondiĉoj esperantistaj kluboj el urboj BRASOV, SIBIU, TIRGU MURES kaj CONSTANTA en Rumanio estis devigataj ĉesi la agadon.

En la rumanlingva ĵurnalo "CEAHLAUL", organo de la distrikto Neamt el la 14-a de aŭgusto 1982 aperis artikolo pri esperantista movado en la urbo ROMAN titolita: "Esperantistii din Roman" /Geesperantistoj el Roman/. En ĝi estas intervjuo kun prezidanto de la Esperanto-rondo "La Frateco" el Roman, s-ano Rirjoveanu Constantin. - Esperanto-Klubo en Bukareŝto kunvenadas ĉiumerkrede 18-20 horo en la Kulturdomo de la sektoro 3, str. Mircea Voda 5.



## LA UNUA PRESKONFERENCO PRI ESPERANTO KAJ TIES MOVADO

"Doktoro Zamenhof kuracis okulojn, sed ŝajnis al li, ke ankaŭ la mondo estas kuracenda. Li elpensis do antaŭ 95 jaroj Esperanton. La mondlingvon, kiu estas nenies patrolingvo kaj antaŭ kiu ĉiuj nacioj egaliĝas. Zamenhof mortis, Esperanto vivas. En scienco, literaturo, turismo. Milionoj uzas ĝin kaj la intereso por ĝi ascendas ĉie en la mondo. Certe, ĝi ne povas esti ĝenerala kuracilo por la plej grava malsano de la mondo. Sed ĝi povas helpi por ordoni ĝustan terapion. Cetere, por ke la mondo kontraktintu pri la paco, ĉiuj ne devas paroli esperante. Sufiĉas, se oni ekhavos komprenon por ĝi..."

Tio estas vortoj de la redaktoro Jan Plachetka el la centra presorgano de la ĉeĥoslovaka junulara asocio "Mladá fronta" /Juna Fronto/, unu el partoprenintoj de la unua preskonferenco dediĉita al tasko de Esperanto kaj ties movado okaze de la Internacia Komunika Jaro 1983. La preskonferencon preparis Ĉeĥa Ĵurnalista Asocio kunlabore kun ĈEA la 18-an de novembro 1982 en Prago. La demandojn de 20 ĵurnalistoj respondis ne nur elĉtaraj funkciuloj de ĈEA frunte de D-ro Jermář, sed ankaŭ meritinta artisto D-ro Fr. Kožík kaj D-ro Detlev Blanke el GDR. Simile kiel "Mladá fronta" ankaŭ "Svobodné slovo" /Libera Vorto/ jam la 19-an de novembro 1982 publikigis raporton pri la preskonferenco sur sia 1-a paĝo sub la titolo "Esperantistoj por la paco". Dum la preskonferenco estis emfazita porpaca rolo de la Esperanto-movado kaj gravaj avantaĝoj de la lingvo Esperanto por scienco kaj kulturo.

La konferencon teknike preparis nia Komisiono por Preso kaj Informado, kiu kore dankas al ĉiuj afablaj respondintoj: d-roj Vlastimil Novobilský kaj Josef Kavka, al s-ano Jaroslav Mařík, al s-anoj Jiří Karen kaj Josef Rumler el la Belartista Sekcio. Ĉeestis ankaŭ František Patera, nova estro de la ideologia komisiono de ĈEA kaj s-ano Haszprunár, kiu lerte informis la ĵurnalistojn pri Esperanto en radio--amatorismo.

-jkt-

## KOMISIONO DE ĈEA POR PRESO KAJ INFORMADO

s e r ĉ a s :

- 1 volontulon /-inon/, loĝantan en Prago, kun bona lingvoscio de Esperanto, por ordigi eksterlandajn Esperanto-ĵurnalojn en nia sekretariejo /Jilská 10/ kaj zorgi ilian librobindadon;
- 1 kapablan tajpistinon kun bona lingvoscio de Esperanto kiu volus labori ankaŭ kiel administra oficistino en la asocia sekretariejo. Monata salajro inter 1.800 - 2.300,-- Kčs laŭ la ĝisnuna praksio kaj scio de similaj laboroj.

Bonvolu aliĝi rekte en la sekretariejo en Prago, Jilská 10. Pri intereso estiĝi volontulo informu ankaŭ estron de Komisino por preso kaj informado : Jaroslav Klement, kpt. Nálepky 7, 360 04 Karlovy Vary - Bohatice.

## VIII INTERNACIA FOIRO DE ESPERANTO TURISMO EN POLLANDO

En Toruń, Bydgoszcz kaj Varsovio okazis dum la 15-24 de oktobro 1982j la tradicia Internacia Foiro de Esperanto-Turismo.

En Bydgoszcz la Foiro komenciĝis per Internacia Vespero de Amikeco. Dum la Foiro oni faris finkalkulon pri turisma interŝanĝo en 1982j. kaj prijuĝis la tutan ĉi-jaran internacian Esperanto-turismon. Oni ankaŭ prilaboris la " Turisman Esperanto-Kalendaron 1983",kiu enhavas preskaŭ 400 internaciajn Esperanto-aranĝojn en 16 landoj. La partoprenantoj de la Foiro subskribis turismajn kontraktojn por la 1983a jaro; rezulte de la Foiro okazos en la venonta jaro interŝanĝo de Esperanto grupoj inter: Belgio, Britio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Finnlando, Hungario, Italio, Jugoslavio, Pollando, Svedio kaj Turkio.

La Foiron partoprenis reprezentantoj de la LKK-oj de la 68a Universala Kongreso en Budapeŝto kaj 39a Internacia Junulara Kongreso en Debreceno. Ĉeestis ankaŭ la Prezidanto de IFEF, s-ano Joachim Giessner el FRG. Unuafoje venis al Foiro oficialaj reprezentantoj de la grandaj neesperantistaj vojaĝoficejoj : pola "JUVENTUR", hungara "EXPRESS", ĉeĥa "REKREA" kaj du novaj: turka " MATUR TURIZM" kaj jugoslavia "POLET TURIST".

La Esperanto-turismo en Pollando akiras fortan pozicion. Prezidanto de MONDA TURISMO kaj direktoro de "ESPERANTOTOUR" - Turisma Servo de UEA, mag. Andrzej Grzębowski ricevis ŝtatan premion de la pola Ministro pri turismo ĝuste por la Esperanto-turismo. La 29an de oktobro en televida tutlanda ĵurnalo estis prezentita kelkminuta filmo pri VIII-a Internacia Foiro de Esperanto- Turismo.

### J U B I L E A S V O Ĉ O

En 1983-a jaro " VOĈO ", la Jugoslavia Esperanto-Revuo prifestos sian 10-jaran seninterrompan aperadon kaj tio estas rekordo en jugoslavia E-movado, ke unu gazeto tiel longe, seninterrompe aperas.

Post la Suda Stelo, estas "VOĈO" plej konata jugoslavia gazeto kiun dum tiu tuta tempo redaktas s-ano DUŠAN ADNADJ kaj eldonas E-societo " Fratoj Ribar" el Borovo. Revuo estas primovada, literatura, socia kaj kultura, 20-paĝa, dumonata gazeto en kiu kunlaboras elstaraj jugoslaviaj esperantistoj. Pri "VOĈO" aperis ankaŭ kolora filmo, kiun prezentis al siaj spektantoj Televizio Zagreb.

Vi certe kiel nia redakcio gratulos al gazeto kaj ĝia redakcio en frata lando laŭ adreso : VOĈO, Jugoslavia E-o Revuo, Školska ul. 25, YU- 56227 Borovo.
Ni esperas, ke ni sukcesos por vi ankaŭ interŝanĝe ricevi ĝin. Pri tiu ni traktos kun jugoslaviaj gesamideanoj.



### PEDAGOGIA SEKCIO DE ĈEA ANONCAS AL VI JENAN DECIDON

Funde de realeco, ke iuj instruistoj instruas Esperanton eksterlande/ ekz. en Hungario/ sen scio de ĈEA kaj poste venas diversaj plendoj, decidiĝis pedagogia sekcio jene :

Ĉiu, kiu volas instrui Esperanton eksterlande devas sin anonci al pedagogia sekcio,sukcese plenumi asociajn ekzamenojn pri scio kaj kapablo instrui Esperanton. Ĝi poste ricevos konsenton de pedagogia sekcio. Samtempe ni ankoraŭ nun publike petas ĉiun E-o asocion en social. landoj/ ni tion jam faris perletere/ ke ili n e d u n g u instruiston sen ĉi tiu konsento.

Por daŭra bona kunlaboro inter socialismaj Esperanto- asocioj estas bezona, ke ankaŭ la instruo de Esperanto sed same la socia kaj persona agado de reprezentantoj de ĉeĥaj instruistoj estu kiel eble je plej alta nivelo.

prof. Jaroslav Polenský
estro de Ped. sekcio.

### N O V A A Ŭ M A L N O V A ?

Kiel ni jam informis naskiĝis/renaskiĝis / nova E-o klubo en urbo Náchod. Ili mem nun infomas vin jene :

" Rilate al longjara esperanta-tradicio en urbo Náchod ni ne parolas pri nova E-o rondeto sed pri ĝia renaskiĝo. Post kelkaj jaroj denove komencas komuna laboro/ en klubejo sub kastelo/. Loka grupo de ĈEA estis fondita ĉe urba Kultura centro. Revenantaj filoj el Náchod kaj ĉirkaŭaĵo anoncas al verda familio, ke kun ili oni povas kalkuli. Ĉiu, kiu ankoraŭ staras apude tuj aliĝu al adreso : Karel Strouha, Kamenice 114, 547 01 Náchod.

### KLUBY MEZINÁRODNÍHO PŘATELSTVÍ JAKO KAŽDOROČNĚ.

Vy mladí, děti, učni, studenti, kteří se učíte esperantu, ale i vy ostatní, kteří o takových mladých lidech víte, pošlete nám své adresy. Je to jeden z úkolů mládežnické a pedagogické sekce našeho svazu. O to více nás zajímají ty případy, kdy se děti a mládež učí esperantu v klubech mezinárodního přátelství a interklubech. Svaz si tak vytváří potřebný přehled a doklad o práci esperantistů s dětmi a mládeží. Zašleme vám pro ně diplomky, které jim můžete rozdat v pololetí či na konci roku.
Všechny tyto informace přijímá a diplomy expeduje : Miroslav Malovec, Charkovská 7, 625 00 Brno.

### NIA LOKA GRUPO EN DĚČÍN

anoncas al vi, ke intencas **por vi** organizi ekskurson perŝipe al Hřensko / aprile/ kaj poste aŭtune ili organizos viziton de Píšťany. Kiu interesiĝas petu pli detalajn informojn laŭ adreso : Esperanto klubo, při SKP ROH, Vjeznická ul, 405 01 Děčín

## REGISTRO DE VETERANOJ

Veterana Esperantista Klubo /VEK/ decidis dum la ĉefkunveno en Antverpeno, kiel kontribuo al la 100-jara Esperanto-jubileo en 1987, registri ĉiujn vivantajn malnovajn gees-perantistojn tutmondajn, kiuj lernis Esperanton antaŭ 1948. Ĉiuj, kiuj jam povas kalkuli sin en la kategorion de "veteranoj" /te. esperantistoj jam dum 40 jaroj/ skribu al la suba adreso: 1/ nomon kaj naskiĝdatojn; 2/ jaron de sia esperantistiĝo; 3/ kompletan adreson.

Veterana Esperantista Klubo /VEK/, Julie Winter, Obere Str. 8, D-3549 WOLFHAGEN 1, FRG.

## JUNULARA SEKCIO DE ĈEA AKTIVAS

Por printempo kaj aŭtuno estas prepatitaj junularaj renkontiĝoj kun turista kaj kultura programo. Ankaŭ la slovaka junularo proponas siajn aranĝojn - en julio Junularan someran lernejon de Esperanto en Bardejov kaj en oktobro ascendon sur la monton " Králova hola ". La sekcio klopodas realigi kunlaboron kun la porjunularaj kaj por infanaj presaĵoj Mladý svět, Mladá fronta, Pionýr kaj rekompence prepari artikolojn pri la ĉeĥoslovakaj junularo kaj infanj en ĉeĥoslovakaj numeroj de Paco. Gravan taskon la sekcio vidas en preparo de gejunuloj por asocia ekzameno kaj poste por diversaj funkcioj en la asocio kaj en lokaj grupoj, precipe por instruado de la internacia lingvo, ĉar la Esperanto-instruantoj estas ĉiam malmultaj. La junularo ofte atendas de la asocio kaj de la sekcio interesan aranĝon, renkontiĝon, seminarion, kurson ktp., sed ili forgesas, ke ĉion preparasmatore ordinaraj homoj en sia libera tempo, kaj se ĉiuj nur pasive atendas kion faros la ceteraj, ne povas ĉi tiu aktivado progresi.

M.M.

Membroj de Junulara sekcio de ĈEA ĉe Esperanto-klubo en Praha preparis por 65a datraveno de Granda oktobra socialista revolucio kaj 60a datraveno de estiĝo de USSR interesan prelegon laŭteme Historio de USSR sur poŝtmarkoj. S-ano Haszprunár preparis por tiu prelego ankaŭ ekspozicion de PM.
Dum tiu ĉi datraveno estis aranĝita en klubejo de EKP ankaŭ vitrokesto laŭteme" Lando de mia korespondanto" kaj ligis novajn korespondkontaktojn kun E-o klubo en Moskvo.

Laŭ inf.ing.Pečený



## KORESPONDI ✻ DEZIRAS ✻ ANONCOJ

Por ĉiuj 25 vortoj vi pagos 15 Kčs aŭ 5 irpk. Abonantoj el eksterlando turniĝu al viaj perantoj pri detalaj informoj!

Kun ĉeĥaj geesperantistoj korespondos 34-jara eletromontero komencanto en E-o, kiu ŝatas literaturon, poemojn, muzikon, turistikon. Skribu al adreso : GEJ. ZO Revenyi, 1105 Budapest, Shörösi Csorna, Sándor ut 43/51, A/1 III em. 4a, Hungario.

Estonta partoprenanto de UK en Budapesto, 32-jara fraŭlo, aviadisto, deziras korespondi tutmonde esperante, angle, germane, france, ruse kaj interŝanĝi BK, PM, INSIGNOJN ktp.

Skribu al : Jurij Petroševič, Gagarina, Pr. 2 1/2 USSR 703 003 Samarkand.

**G D R :**

Angela BEHR, DDR-7113 MARKLEEBERG, Koburger Str. 83, GDR /35-jara oficistino; dez. kor. pri ĉiuj temoj/

Mr Dr Ruth FINSTERBUSCH, DDR-MAGDEBURG, Semmelweiss-str. 45, GDR /57-jara; dez. kor. kun medicinaj fakuloj/

Margarete FÖRSTER, DDR-9704 FALKENSTEIN, Auerbacher-str. 36, 14-01, GDR /46-jara dommastrino; dez. kor. pri ĉiuj temoj/

Kersten GOTTSCHALL, DDR-6300 ILMENAU, Oberpörlitzerstr. 12, GDR /21-jara vitrofaristino; dez. kor. pri ĉiuj temoj/

Sylvia HÜBNER, DDR-6300 ILMENAU, Naumannstr. 3, GDR /31-jara oficistino; dez. kor. pri ĉiuj temoj/

Vivian von KRSHIWOBLOCKI, DDR-8250 MEISSEN, Am Röhrbrunnen 1, GDR /31-jara inĝ. pri akvo-ekonomio; pri ĉiuj temoj/

Brunhilde STIEF, DDR-2080 NEUSTRELITZ, Willy-Bredel-Str. 4, GDR /42-jara instruistino; dez. kor. pri ĉiuj temoj/

Inĝ. Oskar BRAUN, DDR-1220 EISENHÜTTENSTADT, Pawlowallee 4, GDR /69-jara inĝeniero; dez. kor. pri ĉiuj temoj/

Jürgen KLINK, DDR-1830 RATHENOW, Mühlstr. 7, GDR /20-jara oficisto; dez. kor. pri ĉiuj temoj/

Rainer KLÜTZKE, DDR-2793 SCHWERIN, Neubrandenburgerstr. 12, GDR /37-jara oficisto; dez. kor. pri ĉiuj temoj/

Lothar KÖRNER, DDR-1330 SCHWEDT, Bahnhofstrasse 2, GDR /31-jara kemia faklaboristo; dez. kor. pri ĉiuj temoj/

Detlev MOTZ, DDR-9437 GRÜNHEIN, H. Schein-str. 9, PSF: 133, GDR /44-jara sportinstruisto kaj anstataŭanta direktoro de la Supera Lernejo Grünhein en GDR; dez. kor. pri sporto kaj edukado/

geedzoj Angelika kaj Karl-Heinz FISCHER, DDR-1156 BERLIN, Ho-Chi-Minh-Str. 19/B, GDR /35-jara inĝenierino-ekonomistino kaj 36-jara frizisto; dez. kor. pri profesiaj aferoj/

Ralf KRÄNZEL, DDR-3014 MAGDEBURG, Ackerstrasse 38, GDR /20-jara laboristo; amatora fotografisto kaj karikaturisto; dez. kor. pri ĉiuj temoj - prefere el Ĉeĥoslovakio/

H u n g a r i o :

KRAJNYÁK Andrea, BUDAPEST X, Harmat u. 80, H-1108, Hungario /17-jara lernantino; ŝi ŝatas ekskursi kaj kolektas bildkartojn; dez. kor. pri ĉiuj temoj/

U S S R :

USSR, LITOVIO, Kaunas, pk. 175, al Virginija RAKUIŽAITÉ /21-jara virino, dez. kor. pri Esperanto-propagando kaj interlingvaj problemoj/

R u m a n i o :

Susana FARCZADI, str. Tîrgului 23, RO-4300 TIRGU MURES, Rumanio /dez. kor. pri diversaj temoj/

George MAHALU, str. Soldat Tudor Ion, nr. 4, Bl. 5, ap. 88, BUCURESTI, Rumanio /dez. kor. kaj kolektas esperantaĵojn/

Ioan VAJDA, B-dul Gării nr. 30A, Bloc 225 A, Sc. B., Ap. 18, RO-2200 BRASOV, Rumanio /dez. kor. kaj volonte akceptos viziton el eksterlando - skribu almenaŭ 6 semajnojn antaŭ la alveturo en Brasov/

---

STARTO - nepravidelný věstník Českého esperantského svazu, Jilská 10, 110 01 Praha 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Odpovědný redaktor Zdenko Křimský. Grafická úprava Milan Labašta. Tisk zajišťuje Technické ústředí knihoven Praha. Dohledací pošta Praha 07. Snížený poplatek za poštovné povolen Ředitelstvím pošt Praha pod čj. P/1-1267 ze dne 6. 4. 1979.

STARTO - presorgano de ĈEA, Jilská 10, 110 01 Praha 1. Aperas 6foje jare, jarabono 24 Kčs aŭ 10,50 gld. Mendi eblas ĉe niaj perantoj aŭ ĉe UEA same kiel anoncojn en nia gazeto. Responda redaktoro Zdenko Křimský.

---



Cestovní kancelář mládeže CKM vám nabízí tímto zájezdy na esperantské akce pořádané v MLR a sice :

1. Jarní esperantský festival 18-23.3.1983 v Budapešti za 1.730,-Kčs
2. Divadelní přehlídku 23.3.-30.3.1983 v Budapešti za 1.830,--Kčs.
3. Kongres mládeže TEJO 23.7.-30.7.1983 v Debrecenu za cca 2.100,--Kčs

Ceny se rozumí bez dopravy a kapesného.

Zájemci značkou "X" označí svůj zájem o příslušný zájezd. Vaše objednávky předáme po složení 50% zálohy CKM. Složenku vám zašleme po obdržení vaší objednávky. Uzávěrka objednávek nejdéle do 31.1.1983 pro zájezdy č. 1+2 a do 25.2.1983 pro zájezd č. 3. Vyplněnou přihlášku obratem vraťte.

P ř i h l á š k a

Přihlašuji se tímto na zájezd, který označuji zneménkem "x" a žádám o zaslání složenky na zaplacení 50% zálohy. Beru na vedomí, že bez úhrady tohoto poplatku nebude má objednávka brána jako závazná a po uzáverce založena jako bezpředmětná.

- [ ] Jarní esperantský festival ve dnech 18-23.3.1983 v Budapešti
- [ ] Divadelní přehlídka ve dnech 23-30.3.1983 v Budapešti
- [ ] Kongres TEJO ve dnech 23-30.7.1983 v Debrecenu

........................................................ PSC......
moje adresa

V .............. dne ........198 ....................
podpis

zde oddělete

.............. zde rozstřihnout ..............

N a b í d k a

novinek, které jsou skladem v naší zásilkové službě knih a časopisů.

ks Kčs/ 1 kus

- [ ] ESPERANTSKÉ PEXESO/ užitečná hra zejména pro děti/ ..... 6,50
- [ ] T E R M I N Á Ř Hidraŭlikaj meĥanismoj v E-o, češtině ruštině, němčině .....................16,00
- [ ] POHLEDNICE Z ANGLIE S ESPER.TEXTEM/6 druhů/............ 1,--
- [ ] ENERGIO - TUTMONDA PROBLEMO ............................24,50
- [ ] Několikabarevný katalog výrobků, knih a propagačních materiálů s fotografiemi, popisy, cenami a objednávkami ..15,--
- [ ] AVINJO RAKONTAS/ĉarmaj rakontoj por ĉiuj / .............. 6,--
- [ ] DOLĈA GUSTO de L'PACO/nova vjet. libro/ ................ 4,--

Zásilky vyřizujeme od 20,--Kčs výše a zasíláme na buďto na dobírku anebo doporučeně/podle její váhy/.

..........................................PSČ.........
plná adresa


V ............ dne ......198 ..................
podpis

# Dobre nakúpite

**POTRAVINÁRSKY A PRIEMYSELNÝ TOVAR**
**v obchodných domoch**

## SPOTREBNÝCH DRUŽSTIEV

JEDNOTA



VO VÄČŠINE NAŠICH OBCHODNÝCH DOMOCH
JE ZABEZPEČENÉ OBČERSTVENIE A PODÁVANIE STRAVY

# KOVOVÉ
## METALAJ REMIZOJ
# GARÁŽE

el ŝtala lado - fundamenta farbotavolo - duparta pordego - deklina tegmento - sen planko - facila muntado aŭ sur submuro aŭ sur ebena tereno

Longo 4400 mm - prezo 4840,-Kčs
Longo 5300 mm - prezo 5350,-Kčs
Longo 6200 mm - prezo 5830,-Kčs
Larĝo 3030 mm alto 2450 mm estas egalaj ĉe ĉiuj tri tipoj.

Je mendo fabrikas kaj dum malonga tempo 1-2 semajnoj liveras

# INKLEMO
PRAHA (kooperativo)

Skribajn mendojn sendu al la adreso de komerca fako: INKLEMO PRAHA, maloobchodní úsek, 190 00 PRAHA 9, Spojovací 11, aŭ telefonu al n-ro 83 09 49. Persone mendeblaj en Pragaj vendejoj de la kooperativo. Transporton ni povas certigi. Remizojn ni liveras nur al privatuloj.